## Santander en mia memoro

Santander en la nokto
borde de l' akvo mara,
akvo kiu ĉe l' kajoj
kraĉas verda kaj mava.
(Santander en la nokto, miamemore;
borde de l' maro, de mia nostalgio).

Ombras formoj konfuzaj
de barĝoj kaj ŝirm-toloj.
La gruoj, altiĝante,
staras kvazaŭ fantomoj,
fantomoj kiuj stingas somnolemajn lanternojn
sub prujno, ĉe la dokoj.



(Du maristoj ebriaj
inter akraj blasfemoj,
sur la stratoj lontanaj
iras al la mateno).

Santander en la nokto
borde de l' akvo mara,
akvo kiu ĉe l' kajoj
kraĉas verda kaj mava.
(Santander en la nokto, en la memoro;
en la marbordo, en mia nostalgio).

JOSÉ LUIS HIDALGO IGLESIAS
(Torres, 10ª oktobro 1919 — Madrid, 3ª februaro 1947)
Trad.: Liven Dek

La originala poemo aperis en: *Poesías completas*, 1997.
El *Boletín, año XX, número 249-250, enero-abril 1982*, paĝo 27.

## Romanco pri la rivero Dŭero

Vin, ho vi rivero Dŭero,
oni jam ne akompanas
nek detenas sin aŭskulti
la eternan strofon akvan.
Soria turnas sian dorson
kun indiferento laca,
volas, ke vi ne spegulu
la remparon sendentaran.
Vi ridetas, olda Dŭero,
kun la barb' arĝente blanka
kaj muelas fabel-lirle
la rikolton povre magran.
Inter la sanktuloj ŝtonaj,
inter poploj sorĉe ravaj
pasas, kun la fluo via,
amaj vortoj —vortoj vanaj.
Mi tre volus vin simili
kaj, kvieta kaj fluanta,
kanti, sed en multaj akvoj,
vian verson ĉiam saman.
Vin, ho vi rivero Dŭero,
jam neniu akompanas
nek inklinas plu aŭskulti
vian strofon neglektatan,
krom la paroj idiliaj,
kies koroj vin demandas
kaj en via ŝaumo semas
amajn vortojn —vortojn vanajn.

GERARDO DIEGO CENDOYA, 1922
(Santander, 3ª oktobro 1896 — Madrid, 8ª julio 1987)
Trad: Fernando de Diego.

El *Boletín, 2ª ep., año XIII, nº 72(209), mayo-junio 1975*, paĝo 11.



Saluton!

Numero 19 Februaro 2010

# La Estraro raportis

Laŭ la programo aperinta en *Saluton* nr-o 18, pasinta 29-a de januaro okazis la jara Asembleo de nia Asocio. La sekeretario, S-ro Ullate, legis la protokolon de pasintjara Asembleo. Poste la estraro prezentis la raporton pri la agado farita dum pasinta jaro kaj la bilancon kaj jarajn spezokontojn, proponis la buĝeton por nuna jaro kaj montris la vojon por klopodoj kaj streboj dum nuna jaro. Pri tiuj ne estas novaj ideoj kaj reprenis tiujn de antaŭaj jaroj: aranĝi kursojn, ampleksigi la asocian bibliotekon, daŭrigi la kampanjon pri donacoj al publikaj biliotekoj de esperantaj libroj, okazigi la unua vendredo de ĉiu monato fratecan vespermanĝon kaj la tria sabato asocian ekskurson, ktp.

Ja, el ĉiuj aferoj prezentitaj en nia jara oficiala kunsido ni konstatis la sanon de la asociaj financoj, kvankam ni sugestus pli taŭgan investadon. Pasintjare ni okazis kursoj kaj, laŭ la buĝeto, tiuj denove okazos. La asociaj kunvenoj okaz(i-a)s ĉiuj vendredoj, foje (la unua de ĉiu monato) poste estas komuna vespermanĝo, kaj tiam estas planado pri ekskursoj. Sed, ni konstatas ke tiuj agadoj altiras la atenton de la samaj personoj. Tial, ni demandus, precipe al tiuj kiuj malofte partoprenas la asocian agadon, kion ni faru por plibonigi niajn klopodojn?

Kiu ajn asocio, sed plej grave tiuj kiuj baziĝas sur kursoj, havas problemon rilate kiel daŭre teni la intereson, kiel partoprenigi tiujn lernintojn. Do, kion ni oferu al tiuj lernintoj por ke ili partoprenu aktive en la asocia agado? Ja, ni dezirus ricevi viajn sugestojn kaj ankaŭ vian kunlaboron.

**ASOCIACIÓN CÁNTABRA DE ESPERANTO**
*ret-adreso*: Cantabria@esperanto.es
Banka konto ĉe CAJA CANTABRIA: **2066 - 0050 - 89 - 0900046108**
✉ **Apartado de Correos 2.240. 39080 SANTANDER (Cantabria)**
☎ **676 - 27 50 60** **NIF: G39077201** Cuota Anual: **15 €**

## Ontaj Ekskursoj

S-ino Josefina Díez (Fina) prezentis interesan planon por ekskursi dum la komenco de nuna jaro. Ni dankas al ŝi tiun laboron.

Febrero, 20: Rioĥa: San Millán de la Cogolla, Santo Domingo de la Calzada, Nájera...

Marzo, 20: Rasines, Cuevas de Ramales. Ni bezonas anticipe scii kiom da personoj deziras viziti la grotojn.

Mayo, 22: Cueva de los Franceses, Aguilar de Campoo, Pomar de Valdivia, Mirador de Valcabado, Parque Covalagua. Kial ne aldoni viziton al Villarén, naskiĝloko de Andrés Bravo del Barrio, iniciatinto de Esperanto en Santander kaj eldonisto de la unua hispana revuo pri Esperanto; oni povus profiti la viziton por aranĝi specialan kaj publikan omaĝon.

Aprilo kaj junio ne havas definitivan planon, sed estas du proponoj: Oni sugestis kunvenon kun asturaj gesamideanoj kun eventuala meso en esperanto, ĉu en Covadonga? Alia estas komenci piediradon tra la *Santiaga Vojo* en Kantabrio, do fakte estas vojo proksime de la marbordo.

### 25 años de la Asociación Cántabra de Esperanto

En *Boletín, año 37, número 271, septiembre-octubre 1985*, paĝo 21 aperis informo sub titolo "A. C. E.": La 23an de aŭgusto fondiĝis en Santander la "Asociación Cántabra de Esperanto"; poste leĝe rekonita la 31an de aŭgusto".



Ankoraŭ ni ne scias kiel ni celebros tiel gravan datrevenon de nia organizo. Ja, komuna manĝado certe estos. El la proponoj, ni notis la eblecon aranĝi ekspozicion pere de la paneloj de nia enlanda federacio (ankoraŭ mankas taŭga loko por tio); kolekti kaj eventuale libroforme eldoni la historion de Esperanto en nia komunumo (memoru ke ĉi tie aperis la unua hispana revuo pri nia lingvo, en 1902); ankaŭ estas klopodoj kolekti tradukojn de regionaj aŭtoroj por studi eblecojn kia maniere aperigi tiun materialon. Ni jam komencis kolekti informojn pri la regiona historio de Esperanto kaj ankaŭ pri la tradukoj de regiona literaturo. Kiu ajn kunlaboro estos bonvena. Ankaŭ ni petas vian kunlaboron pri pliaj realigeblaj ideoj, lige kun la celebrado de nia 25-jara ekzistado. Ĉu denove klopodi la restarigon de strato Zamenhof?



## Movadaj Apogoj

Las organizaciones que se dedican a la difusión y sostenimiento del Esperanto precisan el apoyo de cuantos estamos interesados en la propagación de la idea de una lengua común para la humanidad. Hemos seleccionado algunas que consideramos que realizan una importante labor en pro de esa idea:

*Federación Española de Esperanto* - cuota de socio . . . . . . . . . . . . . . . . 32 €

Recibe el *Boletín*, interesante publicación que informa, sobre todo, de los acontecimientos relacionados con el Esperanto en nuestro país.

*Universala Esperanto-Asocio* - cuota de socio con *Gvidilo* . . . . . . . . . . 10 €

cuota de socio con *Jarlibro* . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 24 €

cuota de socio con *Jarlibro* kaj revista *Esperanto* (11 números) . . 60 €

Existen otras posibilidades de apoyo, que podéis consultar en nuestra Asociación, como el abono a revistas, o cuota de socio protector...

*Monato* - Magazino en esperanto - abono . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 47 €

La versión en PDF, cuesta el 60% de la edición en papel.

*Otras posibilidades*: existen otras revistas interesantes, como: *Literatura Foiro, La Gazeto*, *La Ondo de Esperanto*... de cuyas cuotas podéis informaros en nuestra Asociación.

Hay otras interesantes posibilidades de ayuda a actividades esperantistas por medio de fundaciones o cuentas especiales. Citaremos algunas:

*Fundación Esperanto*. Española, que distribuye anualmente ayudas según propuestas. Ofrece la ventaja que las donaciones que se le entregan son deducibles en el Impuesto sobre la Renta de las Personas Físicas.

Cuentas Específicas de *Universala Esperanto-Asocio*. Una veintena de cuentas dedican las donaciones recibidas a un objetivo señalado: Afrika, América, Juventud, Propaganda, Oficina de Nueva York... Destacaríamos, sobre todas, *Konto Espero*, cuyo fin es ayudar a esperantistas víctimas de guerras y catástrofes naturales. *Fondaĵo Hodler* cuyo objetivo es fortalecer las finanzas de la Asociación Universal.

95a Universala Kongreso de Esperanto

Havano, 17–24 julio 2010

***Reuniones de Esperantistas***

La 6-a Ibera Renkontiĝo se celebrará en Almagro (Cáceres), del 9 al 11 de abril.

El 69º Congreso Nacional de Esperanto tendrá lugar en Santiago (Galicia), los días 2 al 5 de julio.

Copenhague acogerá el Congreso Universal de Esperanto en 2011.